

## Post la Granda Milito.

## ALVOKO AL LA DIPLOMATOJ.

De D-RO L. L. ZAMENHOF.

*(Aliaj gazetoj bonvole reprenu !).*

Terura milito ekkaptis nun preskaŭ la tutan Eŭropon. Kiam finiĝos la grandamasa recip-roka buĉado, kiu tiel forte malhonoras la civilizitan mondon, kunvenos la diplomatoj kaj penos reordigi la rilatojn inter la popoloj. Al vi, al tiuj estontaj reordigantoj, mi nun min turnas.

Kiam vi kunvenos post la plej ekstermanta milito, kiun iam konis la historio, vi havos antaŭ vi eksterordinare grandan kaj gravan taskon. De vi dependos, ĉu la mondo havu de nun fortikan pacon por tre longa tempo kaj eble por ĉiam, aŭ ĉu ni havu nur kelktempan silenton, kiun baldaŭ denove interrompos diversaj eksplodoj de intergentaj bataloj aŭ eĉ novaj militoj. Pripensu do frutempe kaj tre zorge vian taskon, ĉar nun, kiam por via laboro estas oferitaj multaj centmiloj da homaj vivoj kaj milionoj da tre malfacile akiritaj homaj bonstatoj, vi havos sur vi tre grandan moralan respondecon. Zorgu do, ke via laboro ne estu sencela kaj senfrukta kaj ke post la fino de viaj laboroj la homaro povu diri: ni ne vane alportis la grandegajn kaj terurajn oferojn.

Ĉu vi komencos simple referadi kaj fikadi la karton de Eŭropo? Ĉu vi simple decidis, ke la terpeco A devas aparteni al la gento X kaj la terpeco B al la gento Y? Estas vero, ke tian laboron vi devos fari; sed ĝi devas esti nur negrava parto de viaj laboroj; gardu vin, ke la referado de la karto ne fariĝu la tuta *esenco* de viaj laboroj, ĉar tiam viaj laboroj restus tute senvaloraj kaj la grandegaj sangaj oferoj, kiujn la homaro alportis, restus vanaj.

Kiom ajn vi volos kontentigi la popolojn, kiom ajn justaj vi penos esti kontraŭ diversaj gentoj, vi nenion atingos per referado de la karto, ĉar ĉiu ŝajna justeco koncerne unu genton estas samtempe maljusteco koncerne alian genton. La nuna tempo ne estas simila al la tempo antikva: sur ĉiu disputebla peco da tero laboris kaj verŝis sian sangon ne unu gento, sed ankaŭ aliaj gentoj; kaj se vi decidis, ke tiu aŭ alia terpeco devas aparteni al tiu aŭ alia gento, vi ne sole ne faros agon justan, sed vi ankaŭ ne forigos sur tiu terpeco la kaŭzon de estonta batalado. La "liberigo,"

## After the Great War.

## AN APPEAL TO DIPLOMATISTS.

Translation by A.E.W.

*(Other papers please copy).*

A terrible war has now involved almost all Europe. When the end is reached of the wholesale mutual slaughter which is so great a disgrace to the civilised world, the diplomats will assemble and will endeavour to re-establish relations between the peoples. To you, on whom this task will fall, I now make my appeal.

When you meet together after the most sanguinary war in the records of history, you will have before you an exceptionally great and important task. It will depend on you whether the world is to have henceforth a settled peace for a very long time, and perhaps for ever, or whether we are to have only a temporary lull, soon to be broken again by various explosions of interracial strife, or even fresh wars. Examine, then, your task betimes, and with serious attention, for now that there have been sacrificed for your labour many hundreds of thousands of human lives and the hard-earned livelihoods of millions, an enormous moral responsibility will rest upon you. See to it, then, that your labour be not aimless and fruitless; see to it that after the end of your labours mankind may be able to say: "Not in vain have we made these immense and terrific sacrifices."

Will you begin simply to remake and patch up the map of Europe? Will you simply decide that the territory A must belong to the nation X and territory B to the nation Y? True, such work you will have to do, but it must be only an insignificant *portion* of your work; take care that the readjustment of the map does not become the whole *substance* of your work, for then your labours would remain valueless, and the huge blood sacrifices offered up by mankind would remain of no avail.

However much you desire to satisfy the peoples, however just you may endeavour to be towards various races, you will achieve nothing by readjustment of the map, for every apparent act of justice towards one race will be at the same time an injustice to another race. The present times are not like the ancient times: on every disputable portion of the earth there have laboured and shed their blood not *one* race only, but *other* races; and if you decide that this or that portion of land must belong to this or that race, you will not only not do a just act, but you also will not

kiun vi donos al tiu aŭ alia terpeco, estos nur sofismo, ĉar ĝi signifos nur, ke al tiu aŭ alia gento vi donos la rajton esti sur tiu terpeco mastroj super homoj de aliaj gentoj, kiuj ankaŭ tie naskiĝis, laboris kaj suferis kaj havas koncerne sian patrujon la samajn naturajn rajtojn, kiujn ĉiu infano havas koncerne sian patrinon. Estas vero, ke tiu gento, kiun vi privilegias, entuziasme krios: "Vivu la diplomatoj!" kaj se tiu gento sur la konkerna terpeco prezentos la plimulton, ĝi per teroro silentigos la aliajn, kaj ĉiuj gazetoj en la mondo diros, ke "la tuta loĝantaro de la terpeco A sentas sin tre feliĉa."... Sed tio estos mensogo, simpla mensogo, kiun la mondo ne komprenos nur pro tio, ke la ĝemado de la terore silentigitaj prematoj, de homoj, kiuj en sia patrujo fariĝis "fremduloj," ne venos al ĝiaj oreloj.

Transdonante ian terpecon al la homoj de tiu aŭ alia gento, vi ĉiam faros maljustaĵon kontraŭ aliaj homoj, kiuj havas la samajn naturajn rajtojn koncerne tiun terpecon. La sola efektive justa decido, kiun vi povas fari, estas: laŭte proklami kiel oficialan, firme interkonsentitan kaj plene garantiitan decidon de ĉiuj Eŭropaj regnoj la sekvantan elemente naturan, sed ĝis nun bedaŭrinde ne observatan principon:—

ĈIU LANDO MORALE KAJ MATERIALE  
PLENE EGALRAJTE APARTENAS AL ĈIU  
SIAJ FILOJ.

Tio estas, ke en sia privata vivo ĉiu civitano en ĉiu regno havas plenan rajton paroli tiun lingvon aŭ dialekton, kiun li volas, kaj konfesi tiun religion, kiun li volas; ke se en la institucioj publikaj estus uzata unu sola regna aŭ loka lingvo, tio estas nur poroportuneca cedo de la malplimulto al la plimulto, sed ne humiliĝa tributo de gentoj mastrataj al gento mastranta. Ĉar la gentaj nomoj, kiujn portas ankoraŭ multaj regnoj kaj provincoj, estas la ĉefa kaŭzo, pro kiu la loĝantoj de unu supozata deveno rigardas sin kiel mastrojn super la loĝantoj de alia supozata deveno, tial ĉiu regno kaj ĉiu provinco devas porti ne la nomon de la gento, sed nur nomon neŭtrale-geografian.

Plej bone estus, se anstataŭ diversaj grandaj kaj malgrandaj Eŭropaj regnoj ni havus iam proporcie kaj geografie aranĝitajn "Unuigitajn Statojn de Eŭropo." Sed se nun estas ankoraŭ tro frue, por paroli pri tio, oni devas almenaŭ per oficiala kaj interkonsentita akcepto de la

remove on that land the cause for future strife. The "freedom" which you will grant to this or that region will be a mere fallacy, for it will signify only that to this or that race you will give the right in that territory to dominate people of other races, who also were born there and have laboured and suffered there, and who have the same natural rights to their fatherland as every child has with regard to its mother. True, that race to which you grant privilege will enthusiastically cry, "Long live the diplomatists!" and if that race has the advantage of numbers in the region in question, it will intimidate the others into silence, and all the newspapers in the world will say that the whole population of the territory A is well pleased... But this will be nothing but an out-and-out falsehood, which the world will not detect simply because the lamentations of the oppressed, terrorised into silence, of people who have become aliens in their own land, do not reach the ears of the world.

In handing over any territory to the people of this or that race, you will always do an injustice to other people who have the same natural rights in respect of that territory. The only really just decision which you can make is: to declare emphatically as an official, deliberately adopted and fully guaranteed decision of all the European nations, the following fundamentally natural, but hitherto unhappily ignored, principle:—

THAT EVERY COUNTRY MORALLY AND  
MATERIALLY BELONGS TO ALL ITS  
SONS IN PERFECT EQUALITY OF RIGHT.

That is, that in his private life every citizen of every state has full right to speak whatever language or dialect he chooses to speak, and to hold whatever religion he wishes to hold; that if in the public institutions one sole state or local language is used, that is a concession of the minority to the majority, merely for the sake of convenience, and not as a humiliating tribute on the part of inferior races to a dominant race. Since the race-names which many kingdoms and provinces still bear are a chief reason why the inhabitants reputed to be of one origin consider themselves as the masters of the other inhabitants with another reputed origin, therefore every state and every province must bear the name, not of some race, but one merely neutral and geographical.

It would be best if, instead of various large and small European states, we should some day have proportionally and geographically arranged "United States of Europe." But if it is as yet too early to speak of this, we ought at least, by official and deliberate adoption of

supre dirita principo forigi tiun grandegan malbonon, tiun senfinan fonton de konstantaj bataloj, kiun prezentas la identigado de lando kun gento.

Kiam la supre dirita principo estos oficiale fiksita per garantiita decido de ĉiuj Eŭropaj regnoj, tiam malaperos la ĉefa kaŭzo de militoj kaj de konstanta reciproka timado kaj senfina armigado, ĉar tiam oni jam neniam kaj nenie povos diri, ke "la patrujo estas en danĝero." Oni scias ja tre bone, ke la vortoj "patrujo en danĝero" ne signifas, ke ĉi volas desiri parton de nia patrujo kaj ĵeti ĝin en la maron, aŭ ke ĉi volas rabi por si la havon de ĝiaj loĝantoj, sed plej ordinare tiuj vortoj signifas simple: "Minacas danĝero, ke sur ia terpeco, kie ĝis nun *mia* gento estis mastro kaj aliaj homoj estis nur pli aŭ malpli tolerataj, morgaŭ eble *alia* gento fariĝos mastro kaj *mia* gento estos nur tolerata.

Kiam en la tuta Eŭropo regos politika justeco *absoluta*, t.e. natura, ĉie kaj por ĉiuj-egala, kiam en ĉiu lando ĉiuj loĝantoj estos morale kaj materiale plene egalrajtaj, kiam la landoj ne portos plu gentajn nomojn, kiam la regna lingvo ne havos plu karakteron genteŝovinisman kaj humiligan kaj ne ekzistos plu gentoj-mastroj kaj gentoj-servantoj—tiam ne ekzistos plu kaŭzo por intergentaj militoj; tiam ĉiu homo povos sidi tute trankvile en sia natura, sole vera kaj sincere amata patrujo, li ne bezonos plu timi, ke ĉi povas "forpreni" ĝin de li, kaj li ne bezonos revii pri forpreno de la patrujo de aliaj homoj.

Mi scias tre bone, ke la malamo inter la gentoj ne malaperos *subite*, en unu tago, kiam aŭ arangan la diplomatistoj faros. Sed por tio poste laboros jam personoj *privataj*, per predikado, edukado, alkutimigado, k.t.p.; de vi, diplomatistoj, ni atendas nur, ke vi donu al ni la *ebion* tion fari. Reciproka malamo inter la diversaj gentoj de la homaro ne estas io natura, kiel ne estas natura ia reciproka malamo inter la diversaj familioj de unu gento: la malamono kaŭzas nur—krom la facile forigebla reciproka nekomprenado kaj nekono—la ekzistado de gentoj premantaj kaj gentoj premataj, la blinda egoismo, fierco kaj kalumniemeco de la unuaj, la natura reagemeco de la lastaj. Estas facile interfratigi homojn liberajn kaj egalrajtajn, sed estas nefareble interfratigi

the principle here indicated, to do away with that enormous evil, that endless source of constant strife which is offered by the identification of country with race.

When the principle above stated has been officially fixed by an authentic decision of all the states of Europe, then the main cause of wars and of constant mutual mistrust and of endless armaments will disappear; for then people will never again anywhere be able to say: "The fatherland is in danger." Right well we know that the words "fatherland in danger" do not mean that somebody wants to tear away a portion of our fatherland and cast it into the sea, or that somebody wants to steal for himself the property of its inhabitants; but those words usually mean simply: "There is a danger imminent, that in a certain territory where hitherto *my* race was master, and other people were only more or less tolerated, perhaps to-morrow *another* race will become master, and mine will be merely tolerated.

When over the whole of Europe there shall be a reign of political justice, *absolute*, or in other words natural, the same everywhere and for all, when in every country all the inhabitants shall be morally and materially invested with complete equality of rights, when countries shall no longer bear racial names, when the state language shall cease to have a character bearing on race dominance and oppression (lit. racially Chauvinistic and humiliating), and there shall no longer exist tyrant races and subject races—then there will no longer exist any cause for interracial wars; then every one will be able to rest quite calmly in his natural, only-true and sincerely beloved native land; he need no longer fear that somebody may "take it away" from him, and he need not dream of taking from other people their native land.

Full well I know that hatred between the races will not disappear *suddenly*, in one day, no matter what arrangement the diplomatists might come to. But this is a matter for the subsequent labours of *private* persons, by public speech, education, influence of custom, and so forth; all we expect of you, diplomatists, is that you will afford us the *opportunity* of doing this. Mutual ill-will between the various races of mankind is not a natural thing, any more than mutual ill-will is a natural thing as between the various families of one race: if we set aside our want of mutual understanding and acquaintance, which admits of an easy remedy, this ill-will has its source only in the existence of domineering races and oppressed races, in the blind egoism, haughti-

homojn, el kiuj unuj rigardas sin kiel rajtajn mastrojn super la aliaj.

Se vi eĉ farus nenion alian, se vi nur forigus la gentajn nomojn de la landoj (afere tre facile farebla), vi jam farus per tio agon eksterordinare gravan, vi kreus novan eron en la historio de Eŭropo. Ĉar en lando kun neŭtrala nomo la tute natura plena egalrajteco de ĉiuj ĝiaj loĝantoj pli aŭ malpli frue nepre estos atingita, sed en lando kun nomo genta la egalrajteco neniam estos plena kaj daŭra, ĉar la malfeliĉa nomo ne sole kvazaŭ pravigos la plej malnoblajn intergentajn maljustaĵojn en la diversgentaj landoj de la orienta Eŭropo, sed eĉ en landoj pli civilizitaj ĝi ĉiam konfuzos la kapojn eĉ de la plej honestaj civitanoj, subtenante en ili ĉiam la opinion kaj senton, ke la lando apartenas nur al tiu gento, kies nomon ĝi portas, kaj ĉiuj aliaj gentoj estas en ĝi nur fremduloj. Eĉ e la plej bona volo la civitanoj de tiu lando ne povas alktimigi al la ideo, ke ili ĉiuj prezentas unu nacion, ĉar por tia nacio simple ne ekzistas vorto, kaj, demandite pri tio, al kiu popolo li apartenas, la loĝanto de tia lando pro manko de tiu vorto estas devigata nomi ian genton; kaj ĉi tiu devigata konstanta alkalkulado sin al ia speciala gento anstataŭ al la komuna nacio de la lando forte subtenas la gentan ŝovinismon kaj malpacon inter la samlandanoj.

Resumante ĉion, kion mi diris, mi ripetas:

Kiam post la fino de la milito kunvenos la diplomatoj, ili povos fari ŝanĝojn en la karto de Eŭropo; sed tio ne devas esti ilia ĉefa laboro. Ilia ĉefa laboro devas esti: starigi en la nomo kaj sub la garantio de siaj registaroj pli-malpli la sekvantajn leĝojn:—

1. Ĉiu regno apartenas morale kaj materiale al ĉiuj siaj naturaj kaj naturigitaj loĝantoj, kian ajn lingvon, religion aŭ supozatan devenon ili havas; neniu gento en la regno devas havi pli grandajn aŭ pli malgrandajn rajtojn aŭ devojn ol la aliaj gentoj.

2. Ĉiu regnano havas plenan rajton uzi tiun lingvon aŭ dialekton, kiun li volas, kaj konfesi tiun religion, kiun li volas. Nur en la institucioj publikaj, kiuj ne estas destinitaj speciale por unu gento, devas esti uzata tiu lingvo, kiu per komuna interkonsento de la regnantoj estas akceptita kiel lingvo regna. En tiuj publikaj

ness, and misrepresentations of the former, and the natural resistance of the latter. It is easy to fraternise men who are free and who enjoy equal rights, but it is impossible to fraternise men, some of whom consider themselves the rightful masters of the rest.

Even if you should achieve nothing else, if you should only abolish the racial names of the countries (a thing very easy to do), you would in this way have done a work of extraordinary importance, you would have created a new era in the history of Europe. For in a country with a neutral name the quite natural complete equality of rights of all its inhabitants must be realised inevitably sooner or later, but in a country bearing a race name equality of rights will never be complete and lasting, for the unfortunate name will not only seem to justify the most despicable interracial abuses in those countries of eastern Europe where the races are mingled, but even in more civilised countries it will always warp the judgment of even the most right-minded citizens, ever perpetuating in them the belief and impression that the country belongs only to that race whose name it bears, and that all its other races are but aliens there. Even with the best of good will, the citizens of that country cannot accustom themselves to the idea that they all constitute one nation, for there is simply no word in existence for such a nation, and the inhabitant, when asked to what people he belongs, is compelled for want of that word to give the name of a race: and this constant compulsory ascription of himself to some particular race, instead of to the general nation of that country, is a strong incentive to racial Chauvinism and civil discord.

Summing up all that I have said, I repeat:—

When after the end of the war the diplomats assemble, they will be able to make changes in the map of Europe; but that should not be their chief labour. Their chief labour should be: to establish in the name and under the guarantee of their governments laws more or less of the following nature:—

1. Every state belongs morally and materially to all its natural and naturalised inhabitants, whatever be their language, religion, or supposed origin; no race in the state must have greater or smaller rights or duties than the other races.

2. Every subject has full right to use that language or dialect which he prefers, and to profess whatever religion he wishes. Only in the public institutions which have no special relation to one race that language shall be used which by common consent of the subjects has been accepted as the state language. In

institucioj, kiuj havas karakteron speciale lokan, anstataŭ la regna lingvo povas esti uzata alia lingvo, se ne malpli ol 9/10 de la urbanoj donis por ĝi sian konsenton. Sed la lingvo regna aŭ urba devas esti rigardata ne kiel humiliga tributo, kiun ŝuldas gentoj mastrataj al gento mastranta, sed nur kiel propravoła poroportuneca cedo de la malpli multo al la pli multo.

3. Pro ĉiuj maljustaĵoj, farataj en ia regno, la registaro de tiu regno estas responda antaŭ Konstanta Tut-Eŭropa Tribunalo, starigita per interkonsento de ĉiuj Eŭropaj regnoj.

4. Ĉiu regno kaj ĉiu provinco devas porti ne la nomon de ia gento, sed nur nomon neŭtrale-geografian, akceptitan per komuna interkonsento de ĉiuj regnoj.

Sinjoroj, diplomatoj! Post la terura eksterna milito, kiu starigis la homaron pli malalten ol la plej sovaĝaj bestoj, Eŭropo atendas de vi pacon. Ĝi atendas ne kelktempan interpacigon, sed pacon konstantan, kiu sola konvenas al civilizita homa raso. Sed memoru, memoru, memoru, ke la sola rimedo, por atingi tian pacon, estas: forigi unu fojon por ĉiam la *ĉefan kaŭzon* de la militoj, la barbaran restaĵon el la plej antikva antaŭ-civilizacia tempo, la *regadon de unuj gentoj super aliaj gentoj*.

D-RO. L. L. ZAMENHOF.

those public institutions which have a specially local character another language may be used instead of the state language, if not less than nine-tenths of the citizens have given their consent to it. But the language of the state or of the city must be looked upon not as a humiliating tribute which subject races owe to a dominant race, but only as a concession made voluntarily and for the sake of convenience by the minority to the majority.

3. For all wrongs done in any state, the government of that state is responsible to a Permanent Pan-European Tribunal, set up by the common consent of all the European States.

4. Every state and every province must bear the name not of any race, but one neutrally geographical, accepted by common agreement of all the states.

Gentlemen, diplomatists! After the terrible murderous war which has set mankind lower than the most savage beasts, Europe looks to you for peace. It looks not for a temporary pacification, but for a constant peace, such as alone is worthy of a civilised human race. But remember, remember, remember, that the only means to attain such a peace is: to remove once for all the *chief cause* of the wars, the barbarous survival from pre-civilised antiquity, the *dominance of race over race*.

DR. L. L. ZAMENHOF.

## El Malproksima Lando.

Verkita de RUPERT VAUGHAN, Totok, Celebes.

### III.—PILKLUDO ORIENTA.

La Mahometanaj enlanduloj de Norda Celebes (kaj eble aliloke en la insulo) havas tre primitivan futbalon. La pilko estas el interplektitaj bambuaĵoj, kvazaŭ sfera kaĝo, sen ia kovrilo, tre malpeza, kaj havas diametron de ĉirkaŭ dekkvin centimetroj. Kvankam oni iasoje aranĝas seriozan konkuradon, oni plej ofte ludas nur hejme, en ĝardeneto, kiu troviĝas antaŭ kaj ĉirkaŭ ĉiu domo, kiel ajn mlagranda; kaj viroj ĉiuaĝaj eĉ knabetoj kaj maljunuloj, kune partoprenas.

Por ludi, la ludantoj staras en du vicoj, unu kontraŭ la alia, je interspaco de kvin ĝis dek metroj, aŭ runde. Iu prenas la pilkon kaj suprenĵetas ĝin en la aeron; la ludanto, al kiu ĝi falas, devas piedfrapi ĝin, aŭ antaŭ ol ĝi alfalos teren, aŭ post la unua resalto, kaj tiel ke iu el la kontraŭa partio povas atingi ĝin per piedfrapo. Tiel la pilko ĉirkaŭsaltas, kaj oni celas tiel daŭrigi kiel eble plej longe. Lertularo povas daŭrigi dum kelkaj minutoj ne lasante al la pilko fali teren. Kiam iu maltrafas, ties

partio perdas poenton, sed plej ofte oni ne konkuras, sed ludas nur pro la ekzercado kaj por montri sian lertecon, kaj ne atentis la rezulton. La plej rimarkinda afero estas la maniero, laŭ kiu oni piedfrapas—ne antaŭen per la piedfingroj, sed de post la dorso kaj per la kalkano! Por tion fari, la ludanto devas lasi, ke la falanta pilko preterpasu post lia kapo—sufiĉe malfacile por Eŭropano; tamen oni montras grandan lertecon kaj, per tiu ĉi metodo, tiel bone trafas, kiel ni per la nia. Jen tre simpla ludo, tute nekonata, mi supozas, en Eŭropo, sed bona kaj saniga sporto; kiu ne postulas multekostan ilaron, kaj por kiu oni facile trovas ludejon.

[Tiu saman ludon ludas la Mahometanoj ankaŭ en la insulo Ceylon. Oĝe ni vidis ilin ludi ĝin sur la *Galle Face* kaj en la *Cinnamon Gardens* en Colombo. Tie oni ofte frapas la pilkon per la suba parto de la supren-turaitaj piedfingroj (kompreneble la piedoj estas nudaj). Estus interese sciigi, ĉu tiu ludo estas komuna por Mahometanoj en aliaj landoj.—RED.]